# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (945) • 2020 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

Sandro Botticelli (1445–1510): Madonna del Magnificat



## Krist-nasko sur pentraĵoj



Bizanca mozaiko, Palermo, 1150

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Amo, espero, laŭdo | 123 |
| Hereza evangelio | 127 |
| Kristnasko, ĉu ne stranga festo? | 133 |
| Krist-nasko sur pentraĵoj | 136 |
| Informetoj: Kristanaj fontoj 10-jara | 140 |
| Informo pri Espero Katolika | 140 |
| Retaj diservoj en Esperanto | 141 |
| Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno | 142 |
| Infan' al ni naskiĝis | 144 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, espereble ni sukcesis pretigi, presi kaj dissendi nian gazeton en sufiĉe bona tempo antaŭ kristnasko, kaj per ĝi vi ricevas malgrandan lumeton en la pandemia mallumo. Ĉar mi vere opinias ke nia DIA REGNO kunportas tiom da diversspecajn artikolojn ke ĉiu leganto povas trovi iun "nutrigan" en ĝi — eble ne ĉiam facile legebla kaj komprenebla — sed pensiga.

Vi havas la eblecon kaj potencon influi la enhavon en vian deziratan direkton, se vi sendas al mi materialon. Ankaŭ reagoj estas bonvenaj, por ke ni sciu ĉu nia laboro plaĉas al vi.

Kiam mi skribas tiujn ĉi liniojn, mi ne scias kian kristnaskan feston ni havos. En Svedio ili atentigas nin, ke ni nur festu kun la plej proksimaj familianoj. Certe, por ni ĉiuj la ĉi-jara festo estos alia ol la pasintaj, kaj eble ni devas ŝanĝi niajn kutimajn tradiciojn. Tio tamen donas al ni eblecon pripensi, kio estas la plej valora kerno en nia festado. Ĉion bonan al vi.

# Amo, espero, laŭdo

## Prediko en Poitiers (Unuiĝinta Protestanta Eklezio) la 1an de novembro 2020

Philippe Cousson, FR

*Rigardu, kian amon la Patro donis al ni, ke ni estas nomataj infanoj de Dio; kaj tiaj ni estas. Pro tio la mondo nin ne konas, ĉar ĝi Lin ne konis. 2 Amataj, nun ni estas infanoj de Dio, kaj ankoraŭ ne elmontriĝis, kio ni estos. Ni scias, ke se li elmontriĝos, ni estos similaj al li; ĉar ni vidos lin, kiel li estas. 3 Kaj ĉiu, kiu havas ĉi tiun esperon rilate lin, sin sanktigas tiel same, kiel li estas sankta.*

1 Johano 3,1–3

Karaj gefratoj, nia tempo estas markita de tiom da malordoj kaj necertecoj, sociaj kaj politikaj problemoj tra la mondo, pandemioj, terorismo, ekologiaj kaj klimataj katastrofoj. Eĉ se ili ne parolas pri tio rekte, vi vidos, ke ĉi tiuj tri malgrandaj versikloj de la unua letero de Johano povas esti por ni konsolo kaj kuraĝigo, kaj eĉ malfermi perspektivon kaj sencon, direkton al niaj vivoj.

La Nova Testamento havas tri partojn atribuitajn al Johano, la Evangelion, ĉi tiujn tri mallongajn epistolojn kaj la libron Apokalipso. Fakuloj ne certas, ĉu ĉi tiuj tekstoj venas de la sama Johano, rekte aŭ nerekte. Sed ĉi tio ne tiom gravas, ke ili estu minimumigitaj. Ni kredas, ke la kanono starigita de la Eklezio en siaj fruaj epokoj estis gvidata de la Sankta Spirito por nia instruado.

Ni do vidu, kion rakontas al ni ĉi tiuj tri versikloj, kaj ni finos trarigardante la ĉitagan tekston el Apokalipso.

Kaj ĝuste kun la verbo vidi komenciĝas ĉi tiu tria ĉapitro. *Vidu*. Mi eĉ povus aldoni, ne estu blinda, ne kaŝu viajn okulojn.

Kompreneble, ni devas vidi la situacion de nia mondo, proksime kaj malproksime. Sed estas io alia, kiun ni ne devas kaŝi, tio, kion ĉi tiu versiklo petas nin vidi: la amo de la Patro por ni.

Kaj ĉi tiu amo, eĉ se la elektita vorto estas sufiĉe forta, *agapê*, eĉ se la diferenco kun la alia vorto *philia* estis tre troigita, ĉar en la Nova Testamento ili estas uzataj indiferente, ĉi tiu amo do kvalifikiĝas ĉi tie. Vidu kian amon, kiaspecan amon. La vorto ankaŭ signifas: el kiu lando. Ĉi tiu amo ne estas ordinara, ĝi havas specialan, rimarkindan, karakterizan kvaliton, kvazaŭ ĝi venus de aliloke, kaj ĝi venas de aliloke.

Kaj ĉi tiu amo estas donita al ni. Li ne nur amis nin, li amas nin. Sen peti ion kompense. Ĉi tiu amo estas donita al ni. Sed ĉi tiu amo donita al ni estas ankaŭ la

amo al aliaj kaj al li. Ĉi tiu amo, kiun li donas al ni, fariĝas pro tio mem nia naturo, nia nova naturo, se ni akceptas surmeti ĝin.

Du versikloj atribuitaj al Johano memorigas tion al ni, facile troveblaj: Johano 3,16 kaj 1 Johano 3,16.

> *Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon.*

Kaj

> *Per ĉi tio ni konas amon: ĉar li demetis sian vivon pro ni; kaj ni devus demeti nian vivon pro la fratoj.*

Ni. Kiu estas tiu ni? Kio karakterizas nin? La alvoko, la alvoko, kiun ni aŭdis. Ni estas alvokitaj infanoj de Dio. Jes, alvokitaj, ne nur nomitaj, sed faritaj, igitaj infanoj de Dio. Alvokitaj, kunvokitaj. Ni, kiuj estis heredantoj de peko kaj kulpo, ni estiĝis filoj de Dio, ni fariĝis filoj de Dio. Kaj ni vere, efektive estas. Iuj dirus, ke ĝi estas mistero, agado de la Sankta Spirito.

Kaj la dua versiklo komenciĝas per ĉi tiu senduba alparolo, tradukita per "Amataj". Tio estas, tiuj, kiuj estas amataj. Vi estas tiuj, kiujn oni amas. Aŭ pli ĝuste tiuj, kiuj komprenas, ke ili estas amataj. Ankaŭ aliaj estas amataj, sed ne komprenis, aŭdis, akceptis tion, sed ankaŭ ili estas amataj kaj ili ne vivas per ĉi tiu amo, kiun ili ignoras en ambaŭ sencoj de la vorto, vole aŭ nevole.

Infanoj de Dio. Nur tio! Heredantoj de Dio. Kaj ne estonte, sed nun ni estas tio.

Kaj mi vidis alian anĝelon suprenirantan de la sunleviĝo, havantan sigelilon de la vivanta Dio; kaj li ekkriis per granda voĉo al la kvar anĝeloj, al kiuj estis donite difekti la teron kaj la maron, 3 dirante: Ne difektu la teron, nek la maron, nek la arbojn, antaŭ ol ni sigelos sur iliaj fruntoj la servistojn de nia Dio. 4 Kaj mi aŭdis la nombron de la sigelitoj, cent kvardek kvar miloj, sigelitaj el ĉiuj triboj de la Izraelidoj: 5 El la tribo de Jehuda estis sigelitaj dek du miloj; El la tribo de Ruben, dek du miloj; El la tribo de Gad, dek du miloj; 6 El la tribo de Aŝer, dek du miloj; El la tribo de Naftali, dek du miloj; El la tribo de Manase, dek du miloj; 7 El la tribo de Simeon, dek du miloj; El la tribo de Levi, dek du miloj; El la tribo de Isaĥar, dek du miloj; 8 El la tribo de Zebulun, dek du miloj; El la tribo de Jozef, dek du miloj; El la tribo de Benjamen estis sigelitaj dek du miloj. 9 Post tio mi rigardis, kaj jen granda homamaso, kiun neniu povis kalkuli, el ĉiu nacio, kaj el ĉiuj triboj kaj popoloj kaj lingvoj, starantaj antaŭ la trono kaj antaŭ la Ŝafido, vestitaj per blankaj roboj, kaj kun palmoj en iliaj manoj; 10 kaj ili kriis per granda voĉo, dirante: Savo al nia Dio, la sidanta sur la trono, kaj al la Ŝafido. 11 Kaj ĉiuj anĝeloj staris ĉirkaŭ la trono kaj la presbiteroj kaj la kvar kreitaĵoj; kaj ili falis sur sian vizaĝon antaŭ la trono, kaj adorkliniĝis al Dio, 12 dirante: Amen; La laŭdo kaj la gloro kaj la saĝeco kaj la danko kaj la honoro kaj la potenco kaj la forto estu al nia Dio por ĉiam kaj eterne. Amen. 13 Kaj respondis unu el la presbiteroj, dirante al mi: Kiuj estas ĉi tiuj per blankaj roboj vestitaj, kaj de kie ili venis? 14 Kaj mi diris al li: Mia sinjoro, vi scias. Kaj li diris al mi: Ĉi tiuj estas la venantoj el la granda afliktado, kaj ili lavis siajn robojn, kaj blankigis ilin en la sango de la Ŝafido.

Apokalipso 7,2–14

Tamen tio ne videblas. La mondo ne konas nin. Ĉar ĝi ne konis Dion. Ĉar ĝi ne vidis, konis, vivis lian amon. La mondo algluiĝis al ŝajnoj. Ĝi vidis tion, kion ĝi volis vidi. Kiu estas la saĝulo? Kie estas la nescianto?

Sed tio, kio ni estos, ankoraŭ ne manifestiĝis, sed ni havas ĉi tiun certecon, ke ĉi tiu manifestiĝo venos.

Estas paralela teksto al ĉi tiu parto, kiu prezentas similecojn, sed ankaŭ signifajn diferencojn. Koloseanoj 3, 4.

*Kiam aperos Kristo, via vivo, tiam vi ankaŭ kun li aperos en gloro.*

En ĉi tiu versiklo estas Kristo, kiu manifestiĝas, sed Kristo kiel estanta via vivo, pleniganta vian vivon. Kaj ĉi tiu manifestiĝo de Kristo en vi, per vi, ankaŭ estos manifestiĝo de tio, kio vi estas kun li. La manifestiĝo de Kristo kiel nia vivo samtempe kondukas al la manifestiĝo de tio, kio ni estas en li.

En nia ĉitaga versiklo, neniu mencio pri Kristo, kvankam li estas menciita en aliaj versikloj de la sama epistolo. Iuj tradukistoj enkondukis lin pro la paralelo. Sed la substanco de la signifo restas la sama. Male al tiu de Koloseanoj, nia versiklo ne enkondukas ian nocion pri tempo, sinsekvo aŭ konsekvenco, sed pri kondiĉo pli logika ol tempa. Temas ĉi tie pri la manifestiĝo de nia fileco, de nia adopto. Ĝi ankoraŭ ne manifestiĝis. Sed per ĉi tiu manifestiĝo, ni estos similaj al li, al Dio, agnoskitaj kiel similaj al li, kaj ni vidos tion, ni scios tion, ĉar ni vidos lin kia li estas, ĉar ni konsciiĝos, kiu li estas, kia li estas, la Amo.

Ĉi tiu manifestiĝo estos manifesta por kiu? Ĉu nur por ni, aŭ ankaŭ por aliaj? Aŭ ĉu ĝi estos atesto al tiuj, kiuj ne vidis kaj ne sciis, kiu Dio estas?

Vidi la amon de Dio, por ankaŭ povi pli fore vidi lin kiel li estas. Jen promeso. Kaj tamen tiom multaj profetoj aŭ patriarkoj, se ili aŭdis lin, ne vidis lin rekte. Memoru pri Moseo, Elija, Jesaja. Sed Jesuo diris al siaj apostoloj: Se vi vidas min, vi vidas la Patron. Ni vidas, ni vivas, ni konas lian amon. Sed baldaŭ ni vidos lin, preter eĉ lia amo. Kaj tio estas nia espero.

La vorto espero troviĝas, en la skribaĵoj atribuitaj al Johano, nur en ĉi tiu versiklo, dum ĝi multe pli ĉeestas en la epistoloj de Paŭlo aŭ Petro. Ĉi tiu malofteco montras al ni ĝian valoron ĉiloke. Post la amo, kiu enkondukas ĉi tiun pecon, jen la espero, kiu konkludas ĝin.

Iuj tradukoj povas esti misinterpretitaj, *tiu, kiu havas ĉi tiun esperon en li, ne estas tiu, kiu havas ĉi tiun esperon en si mem*, ĝi estas tiu, kiu metas ĉi tiun esperon sur lin, do sur Dion. La grava afero ne estas havi ĉi tiun esperon en si mem, sed meti sian esperon en Dion.

Kaj meti nian esperon en Dion, en tiun, kiu amas nin, tio purigas nin. La procezo de purigo ekmoviĝas, de apartigo oni povus ankaŭ diri, de sankteco. Pureco, sanktigo venas de tie, kien ni metas nian esperon.

Interese estas, ke eble ĉi tie estas vortludo. Du adjektivoj havas la saman literumon, krom malgranda akcento, spirito, la ekvivalento de la ĉeesto aŭ foresto de h antaŭ la vorto. Temas pri

"pura" kaj "senscia". Kun aŭ sen ĉi tiu spirito, ĉi tiu h, oni estas aŭ pura aŭ senscia. Estas malmulte inter pureco kaj nescio, kiel malgranda komo iamaniere. Komence oni rakontas al ni plurfoje pri sciado, pri kono, fine oni rakontas pri pureco. Vidi la amon de Dio kaj elekti la vivon aŭ ignori ĉi tiun amon kaj maltrafi la vivon.

Mi nun finos trarigardante la pecon el Apokalipso.

Apokalipso, kiel vi eble scias, tute ne signifas: katastrofo, sed nur Revelacio. Iuj lingvoj konservis la grekan vorton por la titolo de ĉi tiu libro, kiel Esperanto, aliaj tradukis ĝin kiel la angla.

Ĉi tiu libro volas malkaŝi al ni, kiu estas Jesuo Kristo kaj kion signifas la savo, kiun Dio alportas per li, per bildoj kaj simboloj, kiuj estas malfacile kompreneblaj en nia tempo. Mi ne faros detalan analizon de ĉi tiu peco. Estas tiom multaj eblaj interpretoj. Ni povas samtempe legi la historion de savo ekde la Kreo aŭ ankaŭ priskribon de la tempoj de la fino. Ĉi tio ne estas mia temo.

En la ĉitaga peco, estas priskribata homamaso vestita per blankaj roboj.

Gravas noti, ke ĉi tiu verbo, "vestita" estas pasiva. Ĉiuj membroj de ĉi tiu granda homamaso, universala laŭ sia konsisto, ne surmetis ĉi tiujn robojn mem. Ĉiu el ĝiaj membroj estis vestata per blanka robo. Ĉiu fariĝis pura. La purigo ne estas farita de la persono mem. Ĉiu estis vestata, ĉiu estis purigata. Ĉi tio ankaŭ estas la amo de Dio donita.

Kaj kiel blankiĝis ĉi tiuj roboj? En la sango de la Ŝafido. Kaj la Ŝafido estas Kristo. Oni diras al ni, ke ĉi tiu homamaso venas de granda afliktado. Multaj interpretoj. Sed, ĉi tie, tiu, kiu ŝajnas plej konveni al mi, estas tiu, kiu priskribas la nodon de la historio, tio estas la krucumo de Kristo.

La kruco de Kristo estas tipe la manifestiĝo de la savo de Dio. Kun la releviĝo, kiu kompletigas ĝin, la manifestiĝo de lia amo al la mondo. Tien ni devas rigardi, tie ni povas vidi kian amon Dio donis al ni kaj donis al ni vivi. Laŭ tio, ĉu ĉi tiu amo estas vidata, agnoskata, ricevita aŭ ne, oni tiam estas pura aŭ senscia. Kaj tamen, la amo ankoraŭ ĉeestas. La signo daŭre estas tie, videbla por tiu, kiu konsentas rigardi.

La manifestiĝo de ĉi tiu amo en ni estas tio, kio montras al ni, kiaj ni estas, alvokitaj, fariĝintaj infanoj de Dio, amataj kaj vokitaj al amo, en ĉi tiu espero puriganta. Per la amo donita al ni, ni fariĝis similaj al li, ni fariĝos tiaj, sed ni jam estas.

Ni ankoraŭ ne ekkomprenas tion ĉar ni ankoraŭ ne efektigas ĝin, kaj reciproke. Pro tio ke ni ankoraŭ ne komprenis ĉion, restas al ni vojo por iri, sed ni scias, ke ni estas infanoj de Dio malgraŭ tio, kion ni vidas pri ni mem.

Ni prefere rigardu al li, al lia amo, ni komprenos, ke ni estas filoj de Dio, fariĝintaj puraj, kaj pro ĉi tiu espero, kiun li metis en nin, ni povas tiam vivi laŭdantaj, kiel ĉi tiu grandega homamaso en blankaj roboj, antaŭ la trono kaj la Ŝafido.

Amo, espero kaj laŭdo, jen tio, kio devas porti la Eklezion, eĉ en ĉi tiuj malfacilaj tempoj, precipe en ĉi tiuj malfacilaj tempoj. *Amen*.

# Hereza Evangelio

Prelegserio de József Farkas, hungara reformita pastoro, aŭtune 1969

Tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Moto:

Laŭ liaj samtempuloj Jesuo estis herezulo, nur poste lia instruo fariĝis evangelio. Kiam Luther komencis prediki la nove ekkomprenitan evangelion, oni akuzis lin pri herezo, nur poste lia scio fariĝis reformatora pravo. Kiu kuraĝas hodiaŭ prediki tiun herezan evangelion, kiu morgaŭ fariĝos ĉiutaga pano al kristanoj?

## Mental[‡]-higieno 1

*Kiam la fariseoj aŭdis, ke li [Kristo] silentigis la sadukeojn, ili unuece kuniĝis. Kaj unu el ili, leĝisto, demandis lin por elprovi lin: Instruisto, kiu ordono estas la plej granda en la Torao? Li diris al li:* Vi amos la Sinjoron vian Dion en tuta via koro kaj en tuta via animo kaj en tuta via *konscio. Tio estas la plej granda kaj unua ordono. La dua, simila al ĝi:* Vi amos vian proksimulon kiel vin mem. *De tiuj du ordonoj dependas tuta la Torao kaj la Profetoj.*

Mateo, 22. 34–40

Eblas diri la veron per la lingvo de la scienco, sed ankaŭ per la lingvo de la arto aŭ per la lingvo de la religio. La eraro ne fariĝas vero se oni diras la eraron per malfacilaj, sciencaj vortoj, aŭ se en la preĝejo oni predikas ĝin per kanaana lingvo. En la alia flanko la vero ankaŭ tiam havas forton, se ni ne ĉiam aldonas: tion Dio diras. El tiu ĉi predikejo kutime ni parolas per la lingvo de la religio kaj teologio, sed tio ne estas nepre deviga. Hodiaŭ ekzemple alimaniere, per la lingvo de la anim-kuracado mi diros al vi la mesaĝon de la Biblio.

La kuracistaj esploroj havas sufiĉe junan branĉon, kiun oni nomas: mens-higieno, kiu okupiĝas pri la saneco de la homa vivo. Mens-higieno serĉas la harmonion de la homa vivo, sed ne el la direkto de la korpo – el la direkto de la animo. Al la jena demando oni serĉas la respondon: Kiel ni devas agi, kunvivi kun

‡ La origina teksto uzas la internacian vorton *mental*, sed en tiu ĉi teksto la esperanta vorto *mensa* estas uzata.

la aliaj homoj, se ni volas harmonie, trankvile vivi. Nun mi metas la legitajn versiklojn en la lumon de tiu ĉi scienco. Do hodiaŭ la temo ne estas la savado kaj la damnado, la hodiaŭa temo estas via nerv-sistemo.

En la lasta semajno mi ekkonis tre malgajan historion de virino, kiu tiel sumigis sian dekkvinjaran geedziĝon: "Kvankam mi ĉion metis sur ununuran ludkarton". Estis ama geedziĝo, kaj ŝi vere ĉion metis sur tiun ununuran ludkarton: amo, geedziĝo, edzo. Ĉion ŝi donis al sia edzo, kiel servistino ŝi servis liajn dezirojn kaj celojn. Ŝi tute neglektis siajn proprajn aferojn, evoluon. Ŝia ĉio estis la edzo – kaj fine tamen ilia geedziĝo malboniĝis kaj finiĝis. La virino ne povis elteni tion, ke ŝi ĉion metis sur tiun ĉi ununuran ludkarton, kaj tio tamen ne sukcesis, kaj ŝi mortigis sin mem. Laŭ la vidpunkto de la mens-higieno tiu ĉi virino faris du grandajn erarojn – ni lernu nun de tiuj eraroj!

Unu el ŝiaj eraroj estis, ke ŝi ĉion metis sur ununuran ludkarton. Tio mens-higiene estas malbona agado. La vivo estas multe pli riĉa, varia – ne eblas, ne devas meti ĉion sur ununuran ludkarton. Tiu solvo morale, eklezie aspektas tre deca, neniun kritikon oni povas diri kontraŭ tio, se iu metas ĉion sur la ununuran ludkarton de la geedziĝo. Tamen ni devas diri: estas malbone, erare, oni ne rajtas fari tion! Minimume sur du ludkartojn oni devas meti ĉion: *Amu la Sinjoron vian Dion kaj amu vian proksimulon*. Mi kiel pastoro, kiu esploras la aferojn de Jesuo diras, ke ankaŭ tio estas erara, se iu metas ĉion sur Dion, kiel ununuran ludkarton, sed ankaŭ tio estas erara se iu metas ĉion sur homon, kiel ununuran ludkarton. Unu el la bazaj principoj de mens-higieno: *amu la Dion kaj amu vian proksimulon.* Se estas iu problemo de unu el ili, la homo povas kuri al la alia. Se iu seniluziiĝas en Dio, tiu povas kuri al la homo, kaj se iu seniluziiĝas en la homo, tiu povas kuri al Dio. Jes, eblas seniluziiĝi ankaŭ en Dio! Multaj seniluziiĝis en Dio ekde Jeremija kaj Job ĝis hodiaŭ, ĉar Dio estas tute alia ol ni pensas. Kaj ankaŭ la homoj estas tute aliaj, ol ni postulas de ili. Tiel ni estas plenaj de seniluziiĝoj, kaj se iu metas ĉion sur ununuran ludkarton, kiam venas la seniluziiĝoj, tiam neeviteble la vivo iras al katastrofo.

> ***Multaj seniluziiĝis en Dio ekde Jeremija kaj Job ĝis hodiaŭ, ĉar Dio estas tute alia ol ni pensas.***

Sur plurajn ludkartojn ni devas meti nian vivon, sed devas almenaŭ sur tiujn du ludkartojn: Dio kaj homo. Vi havu Dion kaj vi havu homon! "Vi havu Dion" – signifas, ke el la granda monda afero de Dio iu part-afero estu *vere* la via. Rigardante Dion vi batalu por io, lernu ion, amu iun, verku ion. Se vi havas Dion, la homaj seniluziiĝoj multe malpli doloros. Tio ne estas religia vero, tio estas mens-higiena vero. Se vi havas iun spiritan aferon, se vi havas iun belan hobion, se vi rigardas ankaŭ supren, se vi ricevas fortojn ankaŭ de supro, tiam povas veni iu ajn homa inundo – vi ne droniĝos.

La alia eraro, kiun tiu ĉi virino faris, ke ŝi pli multe amis sian edzon ol sin mem, kvankam la versiklo diras: *Amu vian proksimulon kiel vin mem*. "Ĉion al li", "ĉion por li", kaj subite ŝia vivo kolapsis, ĉar ŝi nenian eĥon ricevis. Tiu ĉi virino ne bone amis sin mem, ŝi neglektis sian personecon, ne formis ĝin, ne evoluigis ĝin. "Amu vian proksimulon" signifas, ke ni havas respondecon pri nia personeco; ne signifas ion super-amon. Dio ne ĝojas, se mi tiel amas la alian homon, ke dumtempe mia personeco velkas. Tiu ĉi virino tute ne pensis pri sia propra evoluo, sia pensado, sia misio.

Kun pli kaj pli granda surprizo mi spertas, ke multaj amoj kaj geedziĝoj pro tio finiĝas, ĉar unu el la paro tiel multe amas la alian, ke tion jam ne eblas elteni. Pro tro-amo disiĝas multaj rilatoj, ĉar la homoj nuntempe altetaksas ankaŭ la liberecon, ne nur la amon, kaj kiam estas tro multe da amo, kiel grimpplanto ĝi kovras la alian kaj fariĝas neelteneble peza.

Ni alvenis al nia centra temo: *Amu vian proksimulon!* Kiel ni devas ami, por ke ni plenigu tiun ĉi ordonon? Hodiaŭ troviĝas tre populara penso, kaj de jena penso mi ekiras: la homo estas manipulebla estaĵo. La manipulado estas serio de celtrafaj agoj. Mi agas kun la alia homo, celtrafe agas, iun celon mi volas atingi. Kion la ama homo faras kun sia partnero, ankaŭ tio estas manipulado. Estu nia ekirpunkto: ĝis kiu punkto la manipulado rajtas iri? Kian rajton la homo havas, pro amo manipulu la alian homon? Kion permesas la amo?

Nuntempe realizas la psikologio, sociologio, politiko, kiel timiga povo estas la manipulado. Vane mi provas manipuli kokidon, ke ĝi pensu sin anaso, mi ne sukcesos, sed la ĉirkaŭŝo de la homoj havas nekredeble grandan povon al manipulado, kiel la esploroj montras. Se ni akceptas tion, ni eble povas diri, ke la amo havas rajton kaj devon "en-manipuligi" bonajn aĵojn en la alian homon. Mi havas penson, programon, bildon kaj la alia homo – kiu povas esti mia amanto, mia amiko, mia infano – devas akcepti tiun ĉi penson, programon, bildon. Ĉar mia imago estas bona! Per la fajro de mia amo mi enbruligas tiujn trajtojn en la alian homon, kiujn trajtojn mi imagis por li. Kio estas nia opinio pri tiu ĉi difino: La amo havas rajton la bonajn aĵojn en-manipuligi en la alian homon?

---

***La alia eraro, kiun tiu ĉi virino faris, ke ŝi pli multe amis sian edzon ol sin mem***

---

*Amu vian Dion kaj amu vian proksimulon!* Pri Dio ni havas la ordonon: "Ne faru al vi idolon!" (Eliro, 20,4) La "idolo" signifas, ke mi havas iun bildon, penson pri Dio kaj mi montras ĝin supren: bonvolu, Dio, estu tia, kia estas mia bildo! Dio ne akceptas tiun ĉi manipuladan ludon. Dio estas libera kaj sendependa kaj ĉiam surpriziga.

Se oni ne rajtas manipuli Dion, ĉu oni rajtas manipuli la proksimulon? Se oni ne rajtas fari idolon pri Dio, ĉu oni rajtas fari idolon pri la proksimulo? Se oni ne rajtas esti perfortema kun Dio, ke Li estu kiel mi imagis Lin, ĉu oni rajtas devigi la

proksimulon, ke li estu kiel mi – eble vere en amo – preskribi la proksimulon?

Tie ĉi ni estas je la vera problemo de amo.

Mi diras la plej fortan juĝon pri tiu ĉi agado: kiu tiel amas la alian homon, tiu rabas la estontecon de la alia homo. La estonteco de ĉiuj homoj povas formiĝi kiel ajn, sed se mi baze havas bildon pri la alia homo, mi rabas de li la formiĝantan estontecon. Mi mortigas lian futuron kaj kune kun lia futuro ankaŭ lian nunon, ĉar en la nuno elformiĝas la futuro. Oni ne rajtas tiel ami! La enhavo de la amo estas io alia.

La amo donas fort-spacon al la alia homo, en kiu li povas realigi sin mem. Donas al la alia homo liberecon, sed ne malplenan liberecon. Tian liberecon donas la amo, kiu estas plena per la forto de la helpema, donacema amo, tian liberecon, en kiu la alia homo povas realigi sin mem.

Mi rakontas historion, kiu estas historio de multaj homoj. Naskiĝas infano en familio, ni diru, ke estas knabino. La gepatroj ĝojas, kaj ili sonĝas pri la estonteco de la knabino kaj planas ĝin. Komenciĝas la manipulado: estu bona knabino! Estu kredanta, biblia knabino! Atentu, kiel vi vestas vin! Ankoraŭ ne amikiĝu kun knaboj! Estu frue hejme! Ne perfidu vian Dion, vian honeston, vian familion! La gepatroj havas la bildon, kaj igas la knabinon en la bildon. Dum kelkaj jaroj la gepatroj sukcesas devigi la knabinon havi tiun ĉi "rolon", sed neatendite la personeco de la knabino disiĝas de la bildo, de la rolo. Estiĝas truo inter la rolo kaj la vera homo, kaj la knabino sufokiĝas pro la rolludado. Kutime tiu ĉi sufokiĝo estas la momento, kiam ili venas al mi peti konsilon, helpon. Okazas, ke iu ne povas plenigi la bildon, kiun la gepatroj kreis al si, kaj jam en frua tempo rimarkas tion la infano kaj petas helpon de mi. Sed ankaŭ okazas, ke la gepatroj sukcese "enmanipuligis" la infanon en geedziĝon, kaj en la kvina aŭ deka jaro de la geedziĝo la infano komencas sufokiĝi, ĉar ne plu povas elteni la rolon, kiun la gepatroj al ĝi. Kaj tiam venas al mi. Kion mi konsilu en tiu ĉi situacio? Pezaj kaj riskaj operacioj atendas min kelkfoje. Okazis, ke mi tion devis proponi, ke mia gefrateto, vi ankoraŭ ne ĵetu la rolon, ĉar malantaŭ la rolo estas neniu! Via personeco, via volo tiel malfortiĝis sub la rolo, ke unue ni devas fortigi la internan, novan homon, kaj tiam vi povos subenmeti la rolon, sed nun ankoraŭ vi ne povas.

Estas granda risko, kiam mi forprenas de iu la rolon. Mi ankaŭ spertis ĉarmajn surprizojn. Okazis, ke junulino forigis la rolon, kiun oni trudis al ŝi, kaj devigis ŝin geedziĝi kun viro – kaj en la sen-rola libereco ŝi realizis: *kia ĉarma estas tiu ĉi viro! Se mi libere rajtas ami lin, kaj ne pro la deviga rolo mi devas ami lin, ne pro miaj gepatroj – pro Dio mi devas ami lin – malkovriĝas ke mia edzo estas vere interesa viro.* Sed kompreneble ne estas certe, ke la afero ĉiam tiel bone sukcesas.

Ĉu vi komprenas? Oni, la gepatroj, la pastoroj, la socio enmanipuligis la rolon en la infanon, kaj tiu rolo funkciis dum certa tempo. Oni diras pri tio, ke la eduko

estis sukcesa. Sed, ĝenerale, subite subenfalas la rolo kaj tiam okazas granda viv-krizo, kaj tiam la homo fariĝas homo, kiam iel reagas la homo al tiu ĉi krizo.

Kiam ni pensadas pri tiuj aĵoj, ni denove alvenas al la demando: kiu estas la homo? Kia estas la homo sen manipulado? Kiel ni rigardu la infanon, kiun la gepatroj, la lernejo, la eklezio ĵus nun komencas manipuli? Kiu estas la homo? La respondo montras la limojn de la rajto de la manipulado.

---

*La amo donas fort-spacon al la alia homo, en kiu li povas realigi sin mem.*

---

Jesuo alimaniere pensis pri la homo ol la eklezio pensis. La eklezio – laŭ la dogmo de la prapeko – tion instruas, ke la infano estas denaske kulpanto, faliĝanta, malbona homo. Tiun malbonan homidon, kiu portas ĉiujn homajn pekojn ekde Adamo, oni devas instrui per la disciplinoj de la "bonaj institutoj". Bonaj instituoj estas la familio, la eklezio, la socio. Naskiĝis do "sovaĝa besteto", kaj per la forto de la bonaj institutoj oni devas mildigi lin ke li fariĝu bona, ordema homo. Tio estas la eklezia formulo pri la homo.

Jesuo per siaj malfermitaj okuloj vidis la realon. Li tiel pensis, ke naskiĝis bona kaj ordema homido, kiun la malbonaj institutoj volas detrui. La malbonaj institutoj estas la familio, la eklezio, la socio. El la mano de Dio naskiĝas ĉarma bebeto, kaj per la malbonaj efikoj de la familio, eklezio, nacio, pro la eraraj influoj de la rasa malamo, la antaŭjuĝoj, la malsaĝeco malboniĝas tiu bebeto.

*Se vi ne ŝanĝiĝos kaj fariĝos kiel la infanoj, vi ne eniros en la Regnon de l' ĉieloj* (Mateo 18,3)

Ektimiga estas la kontrasto? Mi samopinias kun Jesuo, kiu diris, ke li liberigas la homon el la spasmo de la sociaj kaj eklezioj dogmoj kaj malamoj – liberigas la homon al la bela libereco de la infanoj de Dio.

Se estas tiel, eble oni ne devus tiel multe manipuli la infanojn. Se estas tiel, eble oni devus donaci pli da libereco al la homo, ke li burĝonu kaj realigu sin mem. Mi certas, ke en la libereco la homo ne nepre fariĝas sovaĝbesto, kontraŭe: des pli oni reguligas la homon, ju pli li fariĝas sovaĝbesto. Atentu la infanojn! Se oni en libereco delikate direktas ilin – ĉar kompreneble devas direkti – subite iu digno, iu bela homa sinteno burĝonas.

Do mi restas je tiu difino, ke la vera amo donacas fort-spacon al la alia homo.

Fine mi ankoraŭ demandas: Se la amo estas tiel bona afero, se estas tiel dezirinda, tiel bela – kial tamen ne funkcias? Ĉar ni devas konstati, ke ne funkcias. Kial estas problemo per la amafero? Mi donas alian difinon pri la amo. Kierkegaard diris: la amo signifas, ke mi senfine ŝuldas al iu. Valoras longe pensadi pri tio! Tiam mi amas iun, se mi rimarkas, ke mi havas senfinan, nerepageblan ŝuldon al la alia homo! Atentu! Tio ne signifas, ke mi faris bonan, gajnan negocon kun la alia homo! Tio ne estas amo, ke mi kaptis la alian, nun mi ĉirkaŭbrakas lin, ĉirkaŭprenas lin,

li estas la mia, kiel bona! La amo signifas, ke mi senfine ŝuldas al li. Estas la problemo, ke tiun ĉi senfinan ŝuldon ni ne povas partopagi. Ni ne havas "monon" por repagi. Tie ĉi estas la granda problemo de la am-afero, ke ĉi tiel ni ne povas ami. Sur la bazo de negoco ni povus ami, sed alvenis inter nin Jesuo, kaj li ĵus tie ĉi povis movigi la am-aferon. Per tiu ĉi Jesuo komencis: lasu ke Dio amu vin, kaj tiam ankaŭ vi povos ami aliulojn. La difino de Kierkegaard validas ankaŭ pri Dio. Ankaŭ Dio prenis senfinan ŝuldon, kiam kreis homojn, vin, min. Preskaŭ estas herezaĵo, sed estas belega evangelio: Dio prenis senfinan ŝuldon kiam kreis nin kiel homojn, kaj Dio akceptas tiun ĉi ŝuldon. Biblio tiel esprimas tion: "Mi ekamis vin per amo eterna" (Jeremia 31,3).

## Ni pensadu pri la sekvontaj:

Mi ankoraŭfoje diras tiun ĉi nekredeblan frazon: Dio akceptis senfinan ŝuldon, kiam kreis vin esti homo. Per senfina amo amas vin la ĉiela Patro. Lia amo ne estas responda amo al via amo. Antaŭe Li amis vin kaj atendas ke iam eksonu via amo respondante al Lia amo.

La amo de Dio baras vin neniel. Li vere donas al vi liberan spacon, ke vi serĉu kaj realigu vin mem. En la rondo de Lia amo vi povas esti eĉ malbona, amara, kruda homo, sed vi scias, ke tiam via vivo komencas resaniĝi, kiam la amo de Dio igas vin, ke per Lia maniero vi amu la aliajn homojn.

Se la amo de Dio estos en vi vere efika, tiam vi komencos ami viajn kontraŭulojn. Kaj tiu ne estos malfacila leĝo, kiun vi nur per sin-turmentado povas plenigi. Ĉarma surprizo kaj ĝojo estos en tiu ĉi amo: Mia Sinjoro, vi donas al mi forton eĉ por tio? Akceptu la amon de Dio, kaj vi ricevu tiun ĝojon!



# Kristnasko, ĉu ne stranga festo?

Wolfram ROHLOFF, DE

Kelkaj opinioj kaj dogmoj, kiuj por studintaj teologoj estas gravaj aŭ almenaŭ diskutindaj, ŝajnas negravaj por la plejmulto de la kristanoj aŭ estas eĉ nekonataj.

Ekzemple en la epoko de la ekleziaj reformoj (16a jarcento) komenciĝis en la reformacia branĉo de kristanismo akra disputo pri unu sola vorto *estas*. En kiu senco Jesuo uzas tiun ĉi vorteton dum la instalo de la Eŭkaristio / Sankta Manĝo kiam li parolas pri pano kaj vino (Marko 14)?

> *22 Kaj dum ili manĝis, li prenis panon, kaj, beninte, dispecigis ĝin kaj donis al ili, kaj diris: Prenu; ĉi tio* ***estas*** *mia korpo. 23 Kaj li prenis kalikon, kaj, doninte dankon, li donis al ili; kaj ĉiuj trinkis el ĝi. 24 Kaj li diris al ili: Ĉi tio* ***estas*** *mia sango de la interligo, kiu estas elverŝata por multaj.*

Luther, samkiel la romkatolika branĉo de la eklezio komprenis laŭvorte: La eŭkaristia pano kaj vino "estas" la korpo kaj sango de Jesuo Kristo. Zwingli kaj kun li la reformita branĉo klarigis, ke pano kaj vino "signifas" aŭ "rememorigas" al la mortinta Jesuo, sed ne "estas". Tiu ekzegeza diferenco kaŭzis, ke dum pli ol 400 jaroj luteranaj kaj reformitaj eklezioj ne festis kune la Sanktan Manĝon. Nur en la jaro 1973(!), per la Leŭenberga Konkordo, finiĝis tiu pli ol 400-jara disiĝo inter tiuj du evangeliaj branĉoj.

## Kion Vi do pensas pri Kristnasko?

Ĉu ne simile *Kristnasko* estas stranga, ĉar estas la festo de "enkarniĝo", de la hom-iĝo de Dio?

Multaj opinias, ke Jesuo certe estis vere bona homo, aliaj diras ke li eĉ estis profeto (islamanoj ekzemple), sed ili tamen neas, ke en Jesuo enkarniĝis Dio, ke en Jesuo Dio naskiĝis kiel homo.

Ĉu logike estas komprenebla, ke Jesuo Kristo estis kaj Dio kaj homo? Ĉu tio ĉi estas grava dogmo aŭ nelogika bagatelaĵo, kiun ni do rajtas forlasi?

Ne nur la tri leteroj de Johano

En 1973, ĉefaj eŭropaj luteranaj kaj reformitaj eklezioj kunvenis en la svisa konferenca centro Leŭenberg (proksime al Bazelo) kaj subskribis la Interkonsenton de Leŭenberg aŭ Leŭenberg Konkordo, ekumena dokumento deklaranta unuecon pere de Jesuo Kristo. Laŭ ĉi tiu interkonsento la eklezioj konsentas inter alie pri komuna kompreno de la Evangelio, inkluzive de elementa interkonsento pri gravaj doktrinoj inkluzive de kristologio, antaŭdestino, Komunio kaj pravigo. Ili deklaras eklezian kunecon, same kiel plenan komunecon en atestado kaj servado. /ĉerpita kaj tradukita el angla *Wikipedia,* red

emfazas, ke eblis vidi kaj aŭdi kaj palpi per manoj, ke Jesuo Kristo estis vera homo (1a Johano 1, 1+3):

*1 Tion, kio estis de la komenco, kion ni **aŭdis**, kion ni **vidis per niaj propraj okuloj**, kion ni **rigardis kaj niaj manoj palpis**, koncerne la Vorton de vivo ...; 3 kion ni **vidis kaj aŭdis**, tion ni anoncas al vi, ...*

Tiutempe multaj homoj neis, ke Jesuo Kristo estas vera homo (1a Johano 4, 1–3), "karno":

*1 Amataj, kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj eliris en la mondon. 2 Jen kiel vi ekkonas la Spiriton de Dio: ĉiu spirito, kiu konfesas, ke **Jesuo Kristo venis en la karno**, estas el Dio; 3 kaj **ĉiu spirito, kiu ne konfesas Jesuon, ne estas el Dio**; kaj ĉi tiu estas la spirito de antikristo, pri kiu vi aŭdis, ke ĝi venas; kaj nun ĝi jam estas en la mondo.*

Hodiaŭ ni eble miras, kial Johano tiom akcentas, ke Jesuo estis homo kun vera homa korpo. Tion ni ja festas kristnaske. Hodiaŭ multaj pridubas ne la hom-econ, sed la di-econ de Jesuo, ke li estas Dio, la Filo. Johano certas, ke ni ne adekvate komprenas Jesuon, se ni ne kredas lin esti  kaj vera homo kaj vera Dio.

En la eklezio de Johano kelkaj piaj homoj opiniis, ke estus ofenda humiligo de Dio, prediki, ke Dio fariĝis homo kaj eĉ suferis kaj finfine mortis kiel ni homoj mortas. Ilia intenco estis akcenti la grandegan majeston de Dio. Tial ili opiniis, ke Kristo nur "ŝajne" estis homo. Kelkaj klarigis, ke dia "Kristo" nur dum certa tempo "loĝis" en la homo Jesuo. La dia "Kristo" antaŭ la kruca morto forlasis "Jesuon" kaj majeste kaj senmakule reiris al sia ĉiela palaco. Aliaj varie supozis, ke la korpo de Jesuo nur ŝajnis esti vere homa, mortebla korpo. Kiam la soldatoj suferigis lin, Jesuo nur ludis, ke li havus dolorojn, tiel kiel perfekta teatra aktoro ludas emociojn. Dio ja ne povas suferi kaj morti, ĉar li estas perfekta, ĉu ne?! Jen Jesuo Kristo – laŭ ili – nur ŝajne estis vera homo.

Ĉu Vi nun komprenas, kial Johano tiom insistas, *ke **Jesuo Kristo venis en la karno**?*

Se aktoro en teatraĵo emociplene deklaras sian senfinan, nemorteblan amon, tiuj vortoj kaj gestoj ja eble kortuŝas nin. Tamen ni scias, ke ili ne estas realaĵo. Teatraĵo estas ludo, fantaziaĵo.

Se same Dio nur ŝajne estus fariĝinta homo, se li nur ludus suferi, timi kaj morti sur la kruco, se Kristo nur perfekte aktoris la rolon de suferanta homo – ĉu iu el ni ne dubus, ke la Dia amo, kiun Jesuo proklamis, ne estus simila al nevera fantasiaĵo?

Tial Kristnasko estas por ni grava festo, ĉar ĝi videbligas, kiom nekompreneble granda estas la amo de Dio al ni: Dio fariĝis unu el ni, mortema homo, karno kaj ostoj!

Johano skribas en sia unua letero, ĉapitro 4:

*7 Amataj, ni amu unu la alian; ĉar la amo estas el Dio; kaj ĉiu, kiu amas, naskiĝas el Dio kaj Dion*

*konas. 8 Kiu ne amas, tiu ne konas Dion, ĉar Dio estas amo. 9 Jen kiel la amo de Dio elmontriĝis en ni: ke Dio sendis en la mondon Sian Filon solenaskitan, por ke ni vivu per li.*
*10 Jen estas la amo, ne ke ni amis Dion, sed ke Li amis nin, kaj sendis Sian Filon kiel repacigon pro niaj pekoj.*
*11 Amataj, se Dio tiel amis nin, ni ankaŭ devus ami unu la alian. ... 19 Ni amas, ĉar Li unue nin amis. 20 Se iu diras: Mi amas Dion, kaj malamas sian fraton — tiu estas mensoganto; ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li vidis, tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidis. 21 Kaj la jenan ordonon ni havas de Li: ke kiu amas Dion, tiu amu ankaŭ sian fraton.*

Do granda estas tiu mistero de la Dia amo al ni, la enkarniĝo. Dum la kristnaskaj tagoj mi volas mediti en diservoj pri tiu ĝojiga mistero ... kantante, preĝante kaj kun ĝojo aŭdante denove kaj denove la vortojn el la evangelio (laŭ Johano 1, 14):

*Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero.*

Dio benu Vin, karaj gefratoj.

**Feliĉan Kristnaskon!**



## Por stabanoj kaj esploristoj en malsanulejoj

Dio favora,
donu lerton, kunsentadon kaj resaltemon
al ĉiuj, kiuj prizorgas malsanulojn,
kaj vian saĝon al tiuj, kiuj serĉas kuracilon.
Fortigu ilin per via Spirito,
tiel, ke per tiu laboro multaj resaniĝos;

per Jesuo Kristo, nia Sinjoro.
**Amen**

Tradukis Jack Warren
Kun la permeso de la Anglikana Eklezio en Britio
Fonto: churchofengland.org

# Krist-nasko sur pentraĵoj

## El diversaj retaj fontoj redaktis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Ĉiu homo ofte renkontiĝas kun bildoj, kiuj montras la naskiĝon de Jesuo. Kaj ĉiu povas trovi tiun enhavon, kiu tuŝas la animon: ĉarmecon, varmajn sentojn kaj profundan teologion.

La evangelioj nur tre mallonge skribas pri la naskiĝo de Jesuo.

Mateo nur per parto de frazo mencias tion, kaj ankaŭ la du frazoj de Luko ne estas longaj:

*Dum tie ili troviĝis, venis por ŝi la tempo, ke ŝi nasku, kaj ŝi naskis sian unuan filon; ŝi vindis lin kaj lin kuŝigis en trogon. Ĉar ilia loko ne estis en la gastejo.*

Luko 2,6, laŭ traduko de Gerrit Berveling

Multe pli detale ni povas legi pri tio, kio estis antaŭe kaj poste: la alveno kaj la ĝojo de la paŝtistoj kaj la tri magoj el oriento.

Je la komenco kristanoj festis la naskiĝon de Kristo je la 6a de januaro, kaj la akcenton oni metis al la Dia apero. Ekde la 4a jarcento oni faris en Romo apartan festotagon al la homa naskiĝo de Jesuo, kaj konscie oni metis la feston al la 25a de decembro, kiu estis pagana festo de la naturo.

Sur la plej fruaj prezentoj, kiuj estis ornamentaĵoj sur ŝtonaj ĉerkoj de kristanoj, oni ankoraŭ ne montris Maria, nur la vindigitan Infanon en trogo kun bovo, azeno kaj paŝtistoj.

La du bestoj ne rolas en la evangelio de Luko, pri ili la fonto estis Jesaja 1,3:



Sarkofago el la 4a jarcento, Milano – unu el la plej fruaj prezentoj



Naskiĝo de Jesuo, ikono

*Bovo konas sian aĉetinton, kaj azeno la manĝujon de sia mastro; sed Izrael ne konas, Mia popolo ne komprenas.*

Poste la ekleziaj saĝuloj donis klarigon, kialon al la du bestoj: la bovo simbolas la judan popolon, kiun ŝnurigas, ligas la leĝo, kaj la azeno simbolas la paganojn, ĉar estas malsaĝa agado adori fetiĉojn. Kaj la infano, Jesuo, liberigas ilin.

En la jaro 431, dum la sinodo en Efezo, oni klarigis la teologian rolon de Maria, kaj deklaris, ke ŝi estas Di-patrino. Tiu ĉi decido havis grandan influon al la prezentado de Maria, kaj jam ekde la 5a jarcento ankaŭ ŝi havas ĉiaman lokon sur la pentraĵoj, kiuj temas pri la naskiĝo de Jesuo. Ekde la 6a jarcento ankaŭ Jozefo ofte estas sur la sceno.

La okcidentaj artistoj ĝenerale en malfermita stalo aperigis la miraklon de Betlehemo.

En la orienta eklezio elformiĝis alia tipo de bildoj, ĉar ili ankaŭ konsideris la apokrifajn skribaĵojn: ili prezentis groton kiel lokon de la naskiĝo, kie Maria ripozas sur matraco, laca pro la nasko, kaj la vindigita Jesuo kuŝas en ŝtona trogo (kiu kelkfoje aspektas kiel altaro), du akuŝistinoj agas ĉirkaŭ Li, ili ankaŭ banas la bebeton (tiam du bebetoj estis sur la bildo), kaj ankaŭ Sankta Jozefo sidas tie.

En Okcident-Eŭropo oni malpli uzis la motivojn de la apokrifaj skribaĵoj kaj ekde la 12a jarcento ili klopodis montri kaj akcenti la intiman rilaton inter la patrino kaj filo.

Grandan efikon havis Sankta Francisco, kiu en 1223 en la arbaro de Greccio elformis trogon sub tegmento, gvidis tien bovon kaj azenon kaj en tiu ĉi ĉirkaŭaĵo li predikis pri la naskiĝo de Jesuo. Pro la efiko de la franciskana mistiko en tuta Eŭropo grandiĝis la signifo de la emocioj. Vekiĝis la deziro en la homoj, ke ili preskaŭ kiel parto-prenantoj povu vidi la religiajn scenojn.

En la 14a jarcento franciskana monaĥo skribis sian vizion per la titolo



12a jarcento, Romo, Santa Maria in Trastevere, mozaiko



Giotto (1267–1337), Naskiĝo de Jesuo, Padova, Arena-kapelo



El Greco (1541–1614): la Sankta familio kun Sankta Anna



Sandro Botticelli (1445–1510): La mistika naskiĝo de Jesuo

Meditadoj pri la vivo de Kristo [org: *Meditationes Vitae Christi*]: Maria sen doloro, apogante sin al kolono naskis sian infanon. Ekde tiam ankaŭ kolono aperis sur la bildoj, eĉ la loko fariĝis al la ruina palaco de Davido en Betlehemo.

Same, en la 14a jarcento Sankta Brigitta en vizio vidis, ke la bebeto – kiu naskiĝis dum unuura momento – lumis, kiam Li kuŝis sur la tero kaj la Virgulino adoreme genuas apud Li kune kun Jozefo.

Anĝeloj, kiuj adoras Jesuon aŭ muzikas, estas oftaj rolistoj sur la bildoj. La paŝtistoj kaj la magoj ofte estas samtempe sur la bildoj, kvankam ili estas la rolistoj de




La magoj kun donacoj, 6a jarcento, Sant'Apollinare Nuovo, Ravenna



Fra Filippo Lippi (cca 1406–1499): Adorado de Jesuo



Albrecht Altdorfer (1480–1538): Naskiĝo de Jesuo



Rogier van der Weyden (1400–1464): Naskiĝo de Jesuo. Sur tiu ĉi bildo la mendanto de la bildo, la princo de Burgonjo estas “partoprenanto” je la naskiĝo de Jesuo, li genuas en la dekstra flanko de la bildo

diversaj epizodoj. La pluraj floroj de la malfrua mezepoko (ekzemple lilo, irido, rozo, kamomilo, lavendo) ne nur estas dekoraĵoj, sed estas simboloj de Maria aŭ Jesuo.

Je la fino de mezepoko ofte oni metis la scenon de la Naskiĝo al civila loko, al ĉambro, kie Jozefo kaj la akuŝistinoj agadas ĉirkaŭ Maria kaj la bebo. Pli poste la akcento transmetiĝis al la paŝtistoj aŭ al la omaĝo de la magoj, kiuj dumtempe pli kaj pli fariĝis reĝoj. ☙



Andy Warhol (1928–1987)



12a jarcento, Romo, Santa Maria in Trastevere, mozaiko

# Informetoj

## Kunĝoju !

La interreta portalo
KRISTANAJ FONTOJ ĵus fariĝis 10-jaraĝa.
* la 1an dimanĉon de Advento 2010




Akuŝisto: Albert J. Urban

- *Vizitu*: **fontoj.net**
- *Esploru*!
- *Ĉerpu*!

Kore salutas vin
*Albrecht Kronenberger*

## Informo pri Espero Katolika

Tre karaj,
mi deziras elkore al vi, ke en vian loĝejon kiel la unua eniru Amo. Mi esperas, ke vi kaj viaj familianoj travivas tiun ĉi pandemian periodon senprobleme; tion mi tutkore deziras al vi.

Al tiuj, kiuj pri tio ne estas informitaj, mi informas, ke plu aperadas la revuo Espero Katolika, kiu estas libere elŝutebla en pdf-formato el la interretaj paĝoj de la Ĉeĥa IKUE-sekcio: *http://www.ikue.org/cz/*

Dio benu!
Tre kore vin salutas via frato Miloš Šváček

**Espero Katolika**
**la oficiala organo de**
**Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista**

Ĉar la revuo Espero Katolika pro manko de la monrimedoj ne povas dumtempe aperadi paperforme, eblas akiri ĝian elektronikan version:

| | |
|---|---|
| Dio Benu 110-2/2018 | Espero Katolika 4-6/2018 |
| Dio Benu 111-3/2018 | Espero Katolika 7-9/2018 |
| Dio Benu 112-4/2018 | Espero Katolika 10-12/2018 |
| Dio Benu 113-1/2019 | Espero Katolika 1-3/2019 |
| Dio Benu 114-2/2019 | Espero Katolika 4-6/2019 |
| Dio Benu 115-3/2019 | Espero Katolika 7-9/2019 |
| Dio Benu 116-4/2019 | Espero Katolika 10-12/2019 |
| Dio Benu 117-1/2020 | Espero Katolika 1-3/2020 |
| Dio Benu 118-2/2020 | Espero Katolika 4-6/2020 |
| Dio Benu 119-3/2020 | Espero Katolika 7-9/2020 |
| Dio Benu 120-4/2020 | Espero Katolika 10-12/2020 |

# Retaj diservoj de Esperanto

Pro la granda kaj laŭdinda laboro de Wolfram Rohloff kaj liaj pluraj diverslandaj kunlaborantoj, dum la pasintaj monatoj 6 diservoj estis dissenditaj pere de Jutubo [Youtube]. Se vi volas spekti/aŭskulti ilin, vi trovos ilin je la jenaj retaj adresoj[‡]:

29. mar 2020: https://tinyurl.com/yy6gskd4
25. apr 2020: https://tinyurl.com/y6m5ysce
30. maj 2020: https://tinyurl.com/yyqgfhlo
8. aŭg 2020: https://tinyurl.com/y2nbtk3x
4. okt 2020: https://tinyurl.com/y5qfhklg
29. nov 2020: https://tinyurl.com/y64z2w7j



Reformacia tago - biblia leciono
31. okt 2020: https://tinyurl.com/yxjwkm5m

‡ Tiuj-ĉi adres-ligoj estas mallongigitaj por pli facile povu retajpi ilin. Ili ne similas, se vi havas ligojn de aliloke, sed same funkcias. /red

Aliĝu al la gruplisto *keli-dia-regno+subscribe@googlegroups.com* por ricevi informon! Philippe Cousson estas administranto de la gruplisto. Anoncu vin!

---

!

Karaj,

Kun bedaŭro mi volas informi Vin, ke ni ĵus nuligis la Bibliajn Tagojn 2021, en Trier. Ni intencas samtempe oferti retajn Bibliajn Tagojn kun prelegoj, diskutrondoj, diservo kaj aliaj vizitindaĵoj.

Kore, Via *Wolfram Rohloff*

# Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno
per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

## Kotizoj de KELI 2021

| | |
|---|---|
| Individua membro (kun Dia Regno) | 20,00 EUR |
| Familia membro (sen DR) | 2,00 EUR |
| Subtenanta membro (kun DR) | 30,00 EUR |
| Dumviva membro (20-obla jarkotizo) | 400,00 EUR |
| Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI, | 16,00 EUR |
| pagante tra libroservo | 18,00 EUR |
| IKUE-anoj rajtas aboni Dia Regno, turnu vin al la kasisto de KELI | 10,00 EUR |
| Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj | 2,00 EUR |
| Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n) | Donaco |

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtĝire al **UEA,** Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**

| | |
|---|---|
| konto-numero en Belgio: | 000-163 1831-97 |
| Germanio, Köln: | 3182 91 509, BLZ 370 100 50 |
| Svedio | 74374-0 |
| Svislando (Bulle): | 12-2310-0 |

3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio,** Rotterdam, menciu: por KELI-konto **kelk-p:** BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
   Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
   ✆ +36 302 000 306; 💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

# Membriĝo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

**Britio**; 15 GBP

Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 “Fellowship of British Christian Esperantists (FBCE).

Kasisto: S-ino Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP;
💻 jean@bisset100.freeserve.co.uk

**Bulgario** *)

Peranto: S-ino Ivanka Kircheva Stoyanova
P.O. Box 701, BG-9000 Varna
✆ + 359 52 639628,
💻 ivanka_esperanto@abv.bg

**Ĉeĥa Respubliko** 450 CZK
kaj
**Slovaka Respubliko** *)

Peranto: Pavel Polnický,
Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
✆ +420 723 672 335,
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Estonio** *)

Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,
EE-10502 Tallin,
💻 endel.ojasild@gmail.com

**Finnlando** 30 EUR

Eblas aboni Dia Regnon uzante landan peranton de UEA aŭ laŭ la pagmanieroj menciitaj sur antaŭa paĝo.

**Francio** 25 EUR

CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
“Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL)”. Kasisto: Samuel Gaillard,
5 rue Maurice Ravel,
FR-63800 Cournon d’Auvergne
✆ +33 (0)4 73 84 31 31,
💻 samuel.gaillard@ac-clermont.fr

**Germanio** 24 EUR

Evang. Darlehnsgenossenschaft Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
“Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V.”
Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
✆ 02573 / 626,
💻 hetifisch@googlemail.com

**Hungario** *)

Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/ B.II.8, HU 1201 Budapest
✆ 01 283 6566

**Nederlando**

20 EUR
Vidu sub la pagmanieroj sur la antaŭa paĝo

**Pollando**

20 EUR
Vidu sub la pagmanieroj sur la antaŭa paĝo

**Rumanio** *)

Peranto: Maria László, OF1.C.P. 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
✆ 062 426182,
💻 laszlo_maria@yahoo.com

**Slovaka Respubliko** *)

Vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko

**Svedio** 20 EUR

Pagu al la sveda UEA-konto (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)

**Svislando** 20 EUR

Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)

**Usono** 30 USD

Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al la peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
💻 jeraldveit@yahoo.com

-------------------

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

# Infan' al ni naskiĝis

(originale verkita en Esperanto)

Jes 9,6 • Tit 3,4; 2,11 • Luk 2,14




INFAN' AL NI NASKIĜIS • M: laŭ *Venite, adoremus* el *Adeste, fideles* de John Reading antaŭ 1681 • E: Albrecht Kronenberger 2018-12-23 el Jes 9,6; Tit 3,4; 2,11; Luk 2,14.